

Fajrero

ESPERANTO-FAKO DE ZK ROH TŽ VŘSR

Aprilo 1959 – n-ro: 1
Redaktoro: Inĝ.J.Werner,
Ostrava 15, Na Lachu 6.

Administranto: Vl. Kočvara,
Ostrava 8, Kamenec 251/3.
Ĉeĥoslovakio.

FAJRERO estas bulteno
de junaj esperantistoj
en Ostrava-regiono.
Aperas laŭbezone.

Ĉi n-ron ilustris:
Inĝ. ark. M. Kalný-

EL LA ENHAVO:

Miozotoj (E.Urbanová) 2
Deklaracio okaze de
la Zamenhofa Jaro. pĝ.2
La grupoj en spegulo. 5
Novaĵoj el la movado
ĉefe el Pollando. 8-10
Libroj, prospektoj,
recenzoj pĝ.10-13
"LEKANTETO" pg.14-15
el "La Verda Ansero" 16
Lingva anguleto 18
Kara Kentucky-land' 19
En lernejoj kaj
kursoj (J. Bureš) pĝ. 30
KONKURSO de Fajrero 21
Pri SET-1959 22
Korespondi deziras 23
Radio 24
Krucenigmo 24

1959 - Zamenhof-jaro

TASKO DE NIA BULTENO.

Per la 1-a numero de Fajrero ni efektivas la planon esprimitan fruntpaĝe de la Tagiĝo 42. Vi ricevas novan ligilon de esperantistoj en Ostrava-regiono. Ĝi ne pretendas esti gazeto, tamen ĝi provos plenigi la vakuon sen centraj periodaĵoj, kiu baras ĝeneralan informitecon, kiu izoligas kaj malfortigas nian movadon, kiu la lingvan progreson, precipe ĉe junaj homoj, lasas en manoj de hazardo.

La nomo de la bulteno estis elektita honore al nia patrona entrepreno VŽKG, kies duonsemajna gazeto portad nomon "Jiskra" (Fajrero).

Por ke ni povu sukcece plenumadi la taskon supre menciitan, estas necese, ke ĉiuj grupoj en Ostrava kaj la regiono mem kontaktu kun la redaktoro. Skribu pri novaĵoj en viaj uzinaj kluboj kaj kultur-domoj, pri via porpaca batalo, pri via korespondado, per kiu vi konvinke dokumentas la brilajn atingaĵojn de nia socialisma ekonomio, montras ĉie la naturbelaĵojn de nia patrujo kaj kreskigas nombron de niaj amikoj.

Fajrero fariĝu nia komunaĵo kaj ankaŭ nia spegulo. La legantoj eksciu pri via verkista aŭ poeta talento. En la konkursoj triumfu viaj lingvaj scioj. Viaj gravaj kaj klaraj instigoj kaj preta kunlaboro estu kreaĵ fortoj de Fajrero!

Eli Urbanová

MIOZOTOJ

Al la mortotago
de d-ro Zamenhof

Estas tut-etaĵ bluj floroj.
Kaj ŝatas ilin raraj koroj.
Ho, diru, diru al mi tion,
kie mi trovas miozotojn?
Ĉar ili havis simpation
de nia Majstro.

Jen krepuskiĝas... Eĉ sen dubo
sur frunt' de l' panjo naĝos nubo...
Ho, diru, diru al mi tion,
kie mi trovas miozotojn?
Ĉar ili havis simpation
de nia Majstro

Vin regas certa maltrankvilo:
Ĉu ili kreskas en aprilo?
Ho, diru, diru al mi tion,
kie mi trovas miozotojn?
Ĉar ili havis simpation
de nia Majstro.

DEKLARACIO

OKAZE DE LA 100-JARA DATREVENO DE LA NASKIĜO DE D-ro L. L. Zamenhof

La 15-an de decembro 1959 estos la 100-jara datreveno de la naskiĝo de D-ro L.L.Zamenhof.

Inspirita de profunda humanismo kaj konscia, ke la diverseco de lingvoj prezentas la fundamentan obstaklon al ĉiuj aspektoj de internacia komunikado kaj, sekve, ankaŭ al pli bona kompreniĝo inter la popoloj, L.L.Zamenhof dediĉis sian grandan talenton kaj ĉiujn siajn fortojn al la solvo de tiu problemo.

En la jaro 1887 aperis en Varsovio la unua lernolibro de Internacia Lingvo, kian li publikigis sub la pseŭdonimo "Esperanto", laŭ kia ankaŭ la lingvo estis poste ofte nomata.

En iom pli ol nuraj sep jardekoj la lingvo disvastiĝis tra la tuta mondo kaj fariĝis en niaj tagoj senduba socia fakto kaj grava kultura faktoro.

Ĉiujare 10.000 ĝis 15.300 personoj apartenantaj al plej malasmaj lingvaj komunumoj, kolektiĝas en diversaj internaciaj kongresoj, konferencoj, seminarioj kaj aliaj aranĝoj utiligante por la raportoj, lekcionoj, prelegoj, diskutoj kaj personaj kontaktoj nur la Internacian Lingvon. Ĉi tiuj estas la solaj internaciaj renkontiĝoj de la hodiaŭo, dum kiuj la komunikado okazas ne nur sen interpretistoj, sed ankaŭ sen himiliĝoj, surbaze de plena egaleco, per la uzo de unu nura neŭtrala lingvo.

Nekalkulebla nombro da homoj, el ĉiuj sociaj tavoloj, daŭre efektivas per la Internacia Lingvo skribajn kontaktojn trans ĉiujn lingvajn limojn.

La scienca kaj belarta literaturo en la Internacia Lingvo - kaj traduka kaj originala - estas jam tre mult-flanka kaj valora. Novaj libroj senĉese aperas. Konsiderinda nombro da gazetoj kaj fakaj revuoj estas regule publikigata en Esperanto. La apliko de la lingvo en la scienco kaj por fakaj celoj konatante vastiĝas.

En radia, turismo, komerco kaj en aliaj sferoj Esperanto akiras novajn poziciojn.

Paralele la lingvo interna evoluis laŭ la sama maniero, laŭ kiu evoluas kiu ajn literatura lingvo, sed samtempe, pro la daŭra intensigada de la internaciaj kontaktoj, ankaŭ plifirmiĝis ĝis unueca kaj kohereco.

Per sia Rezolucio de la 10-a de decembro 1954 la Ĝenerala Konferenco de U.N.E.S.C.O. diskutinte la Raporton de la Ĝenerala Direktoro de tiu organizaĵo, "notis la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de la internaciaj intelektaj intarŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj" kaj rekonis, "ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de U.N.E.S.C.O."

La praktika apliko de Esperanto montris, ke la fundamenta baro al internacia komunikado kaj kunlaborado - la lingva obstaklo - estas venkita por tiuj, kiuj scias la Internacian Lingvon. Tiu obstaklo estas, same tiel, venkebla por ĉiuj aliaj. Necesas nur bona volo kaj iom da fortostreĉo por ellerni la lingvon.

Dum la tuta jaro 1959 okazos ĉie tra la mondo diversaj aranĝoj por memorigi la 100-jaran datrevenon de la naskiĝo de D-ro L.L. Zamenhof. Por kunordigi tiun agadon, kiu atingos sian kulminon la 15-an de decembro 1959, formiĝis speciala Internacia Organiza Komitato, kiu laboras sub la aŭspicioj de Internacia Patrona Komitato, en kiun eniris elstaraj personecoj de la scienco, literaturo kaj ĝenerale kultura kaj publika vivo de diversaj landoj.

La Internacia Organiza Komitato direktas ALVOKON

al ĉiuj internaciaj ŝtataj kaj privataj organizaĵoj;

al ĉiuj internaciaj kaj raciaj sciencaj, literaturaj, klerigaj, kulturaj, komercaj kaj aliaj institucioj;

al ĉiuj direktoj de televido kaj radio;

al la redakcioj de gazetoj kaj revuoj;

al profesoroj kaj instruistaj kaj al ĉiuj aliaj kulturaj agantoj

memorigi en konvena formo la 100-jaran datrevenon de la naskiĝo de D-o L.L. Zamenhof kaj doni sian helpon kaj apogon por la plua disvastigo de la Internacia Lingvo Esperanto.

La Internacia Organiza Komitato turnas sin rekte al ĉiu persono, kiu mem spertis la malfacilaĵojn de la lingva obstaklo en la internaciaj rilatoj, ellerni senprokraste Esp. kaj tiamaniere ne nur mem utitigi la multnombrajn avantaĝojn, kiujn donas la scio de tiu lingvo, sed ankaŭ kontribui al ĝia disvastigo. Ju pli granda estas la nombro de personoj, kiuj scias kaj uzas la Internacian Lingvon, des pli granda estas ĝia valoro kaj des pli utila fariĝas la scio de la lingvo por ĉiu unuopa individuo.

Esperanto ne celas anstataŭigi la ekzistantajn naciajn lingvojn, sed forigi la lingvan haoson en la internaciaj rilatoj servante al ĉiuj kiel neŭtrala instrumento de internacia komunikado.

En Mainz, la 5-an de aŭgusto 1958.

KIU ESTAS KIU EN LA ESPERANTO-MOVADO?

Fakto centfoje ripetiĝanta estas, ke la scio pri tiu aŭ alia persono inter niaj aktivuloj estas minima, se ne nula. Por forigi tiun evidentan mankon en nia dokumenta literaturo, la eldonisto J. Régulo Pérez, per la konataj serioj popularigitaj sub la nomo STAFETO, prenis sur sin la taskon eldoni libron kun la supra titolo (laŭ la multe uzata Who is Who?: ekonomia-politika-diplomata eldonaĵo). La "Kiu estas kiu?" esperantista celas doni koncizajn, sed fidindajn informojn pri pasintaj pioniroj kaj nuntempaj aktivuloj, kiuj iel koninde kontribuis al nia movado. La skemo estas proksimume jena:

Nomoj/ j/-antaŭnomo/j/, eventuale pseŭdonimo/j/.

Data (tago, monato, jaro) kaj loko de naskiĝo, ev. de morto.

Studoj, ev. ankaŭ ŝatokupo/j/.

Civila kuriero, laboro, kutimaj okupiĝoj.

Agada por Esperanto, kun precizaj indikoj pri lokoj, jaroj ktp.

Verkado, kun indiko de kompleta titolo de la pecoj, loko kaj jaro de eldono, ev. numero de eldonoj de ĉiu peco kun pli ol unu.

Notindaj apartaĵoj aŭ aldonajoj.

Ĉio en konciza, telegrafa, leksikona maniero, sed sufiĉe klare por eviti denovan enketon pro dubaj punktoj. La tekston, ĉe plej konataj gravuloj, akompanu bona pasportformata bildo por ornami la biografieton.

La libron redaktas la estinta Direktoro de UEA S-ro Hans Jakob, Palais Wilson, Ĝenevo, Svislando. La estraro de UEA rajtigis lin uzi la riĉan materialon de la UEA-biblioteko en Ĝenevo; plie la redaktoro disponas ampleksan dokumentaron el la redakcio de la "Enciklopedio de Esperanto".

Temas pri kolektiva verko kaj la bonvolan kunhelpon de ĉiuj ni insiste petas kaj tre dankas. Antaŭvideble la libro devas esti finredaktita kaj prestaŭge tajpita frue en 1950.

La grupoj en spegulo

OSTRAVA-VÍTKOVICE. E.rondeto en VŽKG preparas por siaj membroj (gastoj estas kore bonvenataj) interesajn programojn. Certe ankaŭ vi trovos iun vesperon vizitinda.

Jen tuta duonjara plano

- 15.1.1959 Interesaj korespondaĵoj,, (La membroj)
- 22.1.1959 Lumo, koloroj kaj teorio de vidadado. (Inĝ. Werner)
- 29.1.1959 La vespero al komencantoj: Nia verda vivo.
(Vl. Kočvara, J. Badžgoň)

- | | | |
|-------|---|----------------|
| 4.2. | Japanaj fabeloj (kun lumbildoj) | K. Janouš |
| 11.2. | Mi vojaĝas en Jugoslavion (kun filmo) | O. Macura |
| 18.2. | Miru, pensu, ridu... | ERINACO |
| 25.2. | Pri politikaj aktualaĵoj | L. Adámek |
| 4.3. | Kio estas stenografio? | A. Staňura |
| 11.3. | Ni vizitis la foiron en Leipzig | M. Neuwirth |
| | | R. Neuwirthová |
| 18.3. | El la ĉeĥa Parnaso | A. Zdražilová |
| 25.3. | Frederis Chopin (kun gramodiskoj) | L. Čermáková |
| 1.4. | La 44-a Universala Kongreso en Varsovio | J. Werner |
| 8.4. | Vespero de societaj ludoj. | Dr. Kočvara |
| 15.4. | Per kantoj tra la mondo. | L. Čermáková |
| 22.4. | Libera tribuno | |
| 29.4. | La 1-a de majo – laborfesto | Dr. Kočvara |
| 6.5. | Erinaco rigardas tendaron. | ERINACO |
| 13.5. | Filmo pri Someraj Esperanto-Tendaroj. | Vl. Kočvara |
| 20.5. | Divenu, divenisto! (konkurso kun premioj) | ERINACO |
| 27.5. | 30 jaroj de E.movado en Ostrava-regiono. | A. Odehnal |
| 3.6. | MEM – la historio kaj signifo. | Dr. Kočvara |
| 10.6. | Vespero de klasika muziko. | L. Čermáková |
| 17.6. | 130 jaroj de VŽKG en E.propagando. | Vl. Kočvara |
| 24.6. | R. Kudla – Z. Čapek: "Esperantisto, ekesto kaj malaperado" – nova unuaktaĵo kun pianakompano, prezentota. | ERINACO |

Ne forgesu, ke la programoj okazadas ĉiumerkrede precize je la 19,30-a horo en ejoj de ZK VŽKG, Vítkovice, Výstavní-str. (iama Zámek).

La elementan kurson finis 14 gelernantoj, kiuj subiĝis al la ekzameno.

B—kurso (daŭriga) okazas ĉiumerkrede je la 18-a h.

Estis fondita kroniko de fotografaĵoj kaj dua kroniko de nia historio, ĉar la unua jam pleniĝis.

OSTRAVA-tramistoj – preparis por la 23.3.1959 kvaronjaran kunvenon kun kultura programo, en kiu sin prezentis vira kanthoro kaj orkestro de la klubo. Tondra aplaŭdo sekvis ludon de la gitar-duo Piotrovski – Večerek. Pere de epidiaskopo s. Janouš prezentis serion da bildoj "Vojaĝo al Luno" akompanatan per prelego.

OSTRAVA-MICHÁLKOVICE. E.grupo ĉe la minejo Petr Cinger per solena kunveno 29.1.1959 finis la elementan kurson. Al 14 membroj estis transdonitaj kurs-atestoj. La grupo presigis plaĉajn atestojn kaj legitimilojn (mendeblaj ĉe: Esperantský kroužek ZK ROH dolu Petr Cinger, Ostrava-Michálkovice).

ORLOVÁ. Ĉe la Uzina Klubo de minejo Žofie estis 15.3.1959 fondita Esperanto-rondeto iniciate de s. Stankuš Josef.

15.3.-22.3.1959 E.rondeto ĉe la minejo A. Zápotocký okazigis ekspozicion de infandeseĝnaĵoj el la tuta mondo. La ekspozicion afable pruntedonis E.rondeto en Znojmo.

19.3.1959 okazis la prelego "Homoj kaj maro" de s. J. Vítek. Ĉeestis 85 aŭskultantoj.

22.3.1959 je la 9,30 h. kunvenis membroj de la E.rondeto ĉe la minejo A. Zápotocký en sia unua jarkunveno. Estis disdonitaj kurs-atestoj al 12 membroj, kiuj finis la elementan kurson. La solenan kunvenon vizitis pluraj esperantistoj el la regiono. Pri la unujara laboro de la rondeto parolis s. Vl. Slaný, pri la aranĝoj de la Zamenhofa jaro kaj pri la Universala Kongreso en Varsovio prelegis Ing. J. Werner. Drahomír Kočvara taksis la ĝeneralan situacion.

NOVÝ JIČÍN. La nova E.rondeto vigle laboras en tiu ĉi malgranda urbeto danke al niaj aktivuloj A. Satek el Příbor kaj S. Vlček, iama Opavano. La kurson vizitadis (ekde 4.11.1958) 24 personoj.

24.3.1959 efektiviĝis solena vespero, dum kiu projekciis s. J. Solnický el Opava filmon pri Esperantaj tendaroj. La rondeto planas renkontiĝon kun ostravanoj kaj opavanoj.

KRAVAŘE, distrikto Hlučín. Pro iniciato de s. Hanová estis tie komence de marto malfermita la elementa kurso. Ni esperas, ke la kursanoj estas kerno de nova grupo en Ostrava-regiono. Instruas s. Vl. Slaný.

PŘÍBOR. En la loka mezlernejo estas nunjare jubilea Esperanta kurso, ĉar jam dek jarojn estas tie Esperanto regule instruata. Nunjare la kurson vizitas 12 infanoj unufoje semajne po du horoj. Dum ĉiuj dek jaroj instruis s. A. Satek, kiu certe meritas nian sinceran dankon. Ni petas la legantojn pri endo de gratulletero ankaŭ al la lernejo-direktoro. Adreso: 8-letá střední škola, Příbor, Ĉeĥoslovakio. Fine de la lerneja jaro la rondeto intencas aranĝi la ekspozicion de diverslandaj ilustritaj poŝtkartoj. Ĉiu alskribo estos respondita!

En kadro de ZK Tatra Příbor estis en januaro malfermita kurso por komencantoj kaj progresintoj. Instruas ing. V. Grossmann kaj Ant. Satek. Regulaj kunvenoj estas ĵaŭde vespere 19-21 h. En la ejo de ZK Tatra Příbor.

Esperantistoj en Příbor solenas nunjare 20-jaran jubileon de E.movado, kiun interrompis nur la tempo de milito. Gratulon en nomo de ĉiuj kunlaborantoj de "Fajrero"!

STONAVA. E.rondeto aranĝas kurson por komencantoj. La kurso (ekde fino de nov. 1958) estas vizitata de 5 plenkreskuloj kaj 8 gelernantoj el la ĉeĥa kaj pola mezlernejoj. La kurson gvidas s. P. Bubik, helpas s. K. Zipser.

VÍTKOV. Komenciĝo de la Zamenhofa jaro estis en Vítkov digne rememorigita per aranĝo de la ekepozicio, precipe dank' al s. R. Kajš.

BRNO. La tradicia seminario okazis nunjare en tagoj 27.1.-1.2.1959. Sabate 31.1. en "Slovan" giris la ĉeestantoj en kaj sen maskoj en ĉiam pli kaj pli populara esperantista maskobalo. Dimanĉe kunvenis la junularo por interkonsiliĝi pri nunjaraj Someraj E-Tendaroj.

Junularo Brno anoncas siajn programojn en EK Brno:
10.3. Ĉinio al la tutmonda kulturo.

7.4. Printempa humoro.

28.4. Nekonata Tibeto. Horeto pri la lando kaj popolo.

PARDUBICE. La programo de la kunvenoj havas plejparte amuzan formon. "Ni elpensas diversajn metodajn de lernado. La membroj ne ŝatas literaturon kaj historion eĉ la detalan gramatikon." En la elementa kurso estas 10 lernantoj kaj ĉiuj promesas persisti. Krome s. O. Hrubeš gvidas la kurson en 7-a okjara lernejo. Ĉeestas gelernantoj el la 5-7-aj klasoj, entute 35. Oni instruas laŭ Ĉe-metodo unu horon ĉiulunde. La infanoj interŝanĝas desegnaĵojn kun proksimume 6 lernejoj. Ekspozicio de la infanaj desegnaĵoj estas preparata.

PODEBRADY. En la rondetaj kunvenoj oni dediĉas certan tempon al la progresiga konversacio. Post la finigo de kurso por komencantoj ni intencas plivastigi la konversacimomentojn kaj ŝanĝi ilin al lecionoj de progresiga kurso. Laŭ ĝia programo ni intencas skribi lernolibron por progresigaj kursoj. - En la grupo estas organizata ankaŭ la traduka laboro, tradukoj el la ĉeĥa literaturo estas disponigataj al eksterlandaj E.revuo, ekz. al "La Suda Stelo".

ÚSTÍ n/Labem. Decembre okazigis la grupo tre sukcesan Zamenhof-vesperon kun kultura programo kaj filmo. Ĉeestis 40 personoj el Ústí n/Labem, Děčín, Chomutov, Teplice kaj Krupka. - Mi daŭrigas la kursojn por komencantoj kaj progresintoj kaj regule lernas novajn kantojn en la kanthoro. La 11-an de marto 1959 la grupo okazigis sian unuan letervesperon, kiun salutis samideanoj el 12 landoj. La ĉefa programo de la vespero estis pertelefona interparolo kun esperantistoj el Quedlinburg en DDR. La interŝanĝitaj programoj estis ambaŭflanke laŭtigitaj kaj kolektive aŭskultataj. Por la germanaj samideanoj parolis s-ano Johann Haupt, ŝtata premiito inĝ.dr. Sörgel kaj 3 lernantoj de tiea elementa E.kurso. Por la grupo en Ústí n/Lab, parolis s-ano V.Novobilský. En la festaj alparoloj estis akcentite, ke la nuna ĉefa tasko estas senlaca klopodo firmigi la mondan pacon kaj evoluigi bonajn najbarajn rilatojn.

Deziranto unu al la alia plenan sukceson en la laboro por triumfigo de niaj idealoj la ni finis la dudekminutan internacian programon. La esperantistoj en Ústí n/Labem opinias, ke oni aranĝu similajn vesperojn de la amikeco ankaŭ en aliaj grupoj kaj kontribuu tiel al la internacia kompreniĝo.

Fine de aprilo la grupo planas aranĝon de granda kulturprograma vespero, en kiu rolos ankaŭ nia membrino s-anino Drahoslava Královcová, anino da la opero en Ústí n/Labem.

Van

ESPERANTISTA SOMER-LOKO APUD "NIGRA MARO".

El privata letero ni eksciis, ke bulgaraj esperantistoj ricevis donace de Bulgara Komunista Partio 3 hektarojn de tero apud Nigra Maro por elkonstrui internacian somerajn restadejon kun loĝaj kabanoj, ĉiuj bezonaj societaj ĉambroj, kun sportejoj k.a. Nunjare oni eluzos la terenon provizore por tendumado.

ESPEANTAJ KABARETOJ EN OSTRAVA, VARSOVIO, SOFIO.

Agadon de ĉiu grupo povas grave kontribui bonhumoro, sprito kaj amikeco de la membroj, kapablo kritiki kaj akcepti kritikon kaj scio ligi seriozan laboron kun konvena amuzo. La spertoj de la grupo en VŽKG pruvas, ke satiro kaj kabareto entuziasmigas la aktorojn mem kaj grave helpas al sanstato de la tuta grupo. Ostrava "ERINACO" provos ligi kontakton kun nove fondita studenta Esperanta kabareto en Varsovia kaj kun bulgara junulara kabareto "FLAMO" en Sofio.

ALTLERNEJAJ KURSOJ DE ESPERANTA FILOLOGIO
TOWARZYSTWO WIEDZY POWSZECHNEJ
ZAOCZNE STUDIUM JEZYKOZNAWSTWA
I FILOLOGII ESPERANCKIEJ
Warszawa, Palaco de Kulturo kaj Scienco, XIII--a etaĝo.

Studmaterialo estas dividita je tri jaroj, t.e. ses semestroj. Aliĝi povas homoj, kiuj mezlernejon, profesio kaj aĝo ne decidas. La studkotizoj inkluzive por tekstoj estas 200 zlotoj la 1-a kaj 250 zlotoj por la ceteraj semestroj. Fine de ĉiu semestro estas konsultadoj kaj ekzamenoj.

Nun jam kuras tri semestroj kun proksimume 50 studentoj. La prelegoj kaj seminarioj okazas dufoje semajne po du horoj. El vico de instruistoj ni mencias s-rojn B. Nowinski kaj Mg.T.Michalski. Pri la studprogramo jam raportio Tagiĝo n-ro 42. Ankoraŭ ni aldonas, ke oni instruas ankaŭ interstenon. Esperantan literaturon oni dividas je originala kaj tradukita slava, romana, germana, hungar-finna kaj literaturo kompara. Estas interese, ke en la tria semestro estas nun tradukata fragmento el "Ŝvejk" de Jaroslav Hašek (el la pola).

Por koresponda studado anoncis sin 300 personoj el la tuta Pollando. En skiza plano de la instituto estas plivastigo de la koresponda studado ankaŭ je najbaraj landoj, interalie ankaŭ je Ĉeĥoslovakio. Kiu el vi do havas intereson pri la studoj, skribu instige al la supre menciita adreso. Ni eluzu la raran okazon fariĝi studentoj de esperantologio en altlerneja filologia instituto.

Pri la studio oni ankoraŭ traktos dum la 44-a U.K. Antaŭvideble kunlaboros ankaŭ s-roj G. Waringhien, J. Isbrucker, K. Kalocsay k.a.

Estas ĝojiga fakto, ke Esperanto ricevas tian gravan subtenon en Pollando. Per la atingiĝo esperantistoj povas vere fieri.

j-er

ESPERANTO EN POLA RADIO.

Komence de februaro ekfunkciis ĉe Pola Radio la redakcio de esperantlingvaj elsendoj. Pola Radio postulas eĉ du disaŭdigojn tage. En la redakcio jam laboras A.Sikorska kaj J.Uspienski. Pri komenciĝo de la elsendoj ne estas ankoraŭ decidite. (*Vidu la paĝon 13!*)

INFANA TEATRA GRUPO EN PRUSZKÓW (Pollando).

Ĉiuj junaj geaktoroj de tiu ĉi teatro, ankaŭ reĝisoro eklernis la Internacian Lingvon, ĉar ili intencas ludi ankaŭ eksterlande. Pri la bona nivelo de la teatro atestas la fakto, ke unu el la lastaj ludoj, en kiu oni parolas pole, ĉeĥe, germane kaj hungare, estis elsendata el Katowice per pola televido kaj tiun transprenis eĉ la televido ĉeĥa kaj germana.

15-a INTERNACIA JUNULARA KUNVENO de TEJO

okazos en Gdansk de la 24 - 31 Julio 1959 kiel Oficiala Antaŭkongreso de la 44-a Universala Kongreso. Informojn kaj aliĝilojn en Ĉeĥoslovakio liveras: D.Kočvara, Kamenec 251/3, Ostrava 8.

PREPAROJ POR LA 44-a UNIVERSALA KONGRESO.

Meze de marto estis jam aliĝintaj 1.500 kongresanoj el preskaŭ 40 landoj.

La L.K.K. jam faris koncernajn paŝojn por ĝis ekstremo faciligi la ricevon de vizoj en Pollandon. Estas decidite, ke la kongresanoj ricevos 50% rabaton de la kosto por enirvizoj: grupoj kaj karavanoj pagos nur 1,50 us. dol.

Pola Ministerio de Komunikado anoncis, ke konresanoj ricevos 33% fervojan rabaton.

La kongresa programo estos sendata al ĉiu kongresano unu monaton antaŭ la komenciĝo de la Universala Kongreso. La Kongresa Libro ne estos antaŭe sendata, sed disdonata.

Ĉiu kongresano ricevos senpage unu numeron de la reaperonta grandformata revuo en Esperanto "Pollando" kun aldonaĵo "Pola Esperantisto".

Ĉiu kongresano ricevos donace en la kongresejo 240-paĝan riĉe ilustritan libron pri Varsovio.

Antaŭ la Kongreso, 29 Julio - 1 Aŭgusto okazos en Varsovio Internacia Seminario por instruistoj de Esperanto laŭ Cseh-metodo. La Seminarion gvidos Andreo Cseh el Nederlando, aŭtoro de la metodo.

Internacia Teatro el Parizo ludos "La frenezaĵojn de Skapen" de Moliere. Oni traktas pri la prezentiĝo de nia Verda Ĉaro de Julio Baghy kun "Pigmaliono" de B.Shaw.

Ekde la 1-a de aprilo la kotizo por Ĉeĥoslovakio estas 147,00 Kčs. Membroj-abonantoj de UEA havas la kotizrabaton 19,00 Kčs.

REFOJE PRI "STELO"

En la nomo de la Estraro de Studenta Tutmonda Esperantista Ligo, mi varmege alvokas ĉiujn gestudentojn kaj studentajn klubojn, konigi siajn adresojn al la sekretario de STELO: J. C. Wells, Trinity College, Cambridge, Britujo. Necesas, ke ĉiuj studentaj fortoj kunlaboru por progresigi La Internacian Lingvon en la universitatoj, kio estas la nepra bazo por ĝia estonta enkonduko en la lernejojn kaj fina oficialigo! Unueco estas forto!

Paul Ciliga, Prezidento de S T E L O.

STELO ankoraŭ ne havas en Ĉeĥoslovakio sian peranton, sed ni esperas, ke iu el niaj studentoj baldaŭ anoncos sin.

LA VII-a MONDA JUNULARFESTIVALO.

La-28-an de julio 1959 en la kadro de la 7-a Festivalo okazos en Vieno (Aŭstrio) renkontiĝo de junaj esperantistoj.

La programo de la Festivalo (26.7.-4.8.) estas tre riĉenhava kiel ankaŭ tiu de la Esperanta renkontiĝo. Tamen dependas de la esperantistoj mem, ke ili faru ankoraŭ pli riĉan kaj interesan programon. Sendu al ni viajn proponojn kaj sugestojn.

Ni ankaŭ ĝoje salutas tiujn esperantistojn, kiuj traveturante al la 44-a Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio (1-8 Aŭgusto) haltos en Vieno.

Anoncu vian partoprenon al: Preparkomitato de la VII-a Festivalo, "Esperanto", Wien I, Seilerstätte 15, Aŭstrio.

LIBROJ – PROSPEKTOJ - RECENZOJ

Nova Esperanta marŝo. Muzik-eldonejo PANTON, Praha 1 – Malá Strana, Besední 3, Ĉeĥoslovakio, eldonos novan Esperantan marŝon "Vivu Esperanto" en la aranĝo por fortepiano kun gitarsignoj kaj Esperanto-teksto. La marŝo estos eldonita, se PANTON ricevos mendojn por almenaŭ 1500 ekzempleroj entute. Prezo por unu ekzemplero estas 4 Kčs (t.e. proksimume 7 respondkuponoj). - La marŝ-kanto riĉigos viajn klubajn programojn, ĝi estos bela donaco por viaj korespondantoj; per viaj amasaj mendoj al la supra adreso subtenu nian penetron en la oficialan eldonejon.

Prospektoj. Post aperigo de turisma prospekto pri Ĉeĥoslovakio (eldonis: Ĉedok, Praha 3, Na Příkopě 15.) venis en niajn manojn plua turisma prospekto en Esperanto, nome pri OLOMOUC, ricevebla senpage de: Turista-Ĉedok, Olomouc, Stalinova ul., ĈSR.

Antaŭ kelkaj tagoj aperis prospekto pri nunjara specimena FOIRO en BRNO.

Aperis Literatura aldono al "Esperanto en Slovakio; jarkolektoj 1957-58, kies nomo estas ALMANAKETO. Sur 68 paĝoj ni legas tradukitajn kaj originalajn litaraturaĵojn de J.V.Dolinský, P.Rosa, R.St.Seemann, nacia artisto M.Benka, Ed.V.Tvarožek, Gnafalio kaj M.Raveň. La libreto, presita per "Rotaprint" estas bone legeble kaj enhavas rimarkindajn fruktojn de literatura laboro de la slovakaj E.aŭtoroj.

La Almanaketo estas mendebla por 10 Kčs ĉe: D-ro L. Izák, Martin, Gottwaldova 14.

"Skizo pri la Esperanta literaturo" (V.Novobilský). Oni povas aĉeti lastajn ekzemplerojn de tiu ĉi literatura lernolibro de niaj tendaroj. Kvankam ĝi estis destinita por niaj Someraj Esperanto-Tendaroj, tamen ĝi penetris eĉ eksterlanden. El multaj recenzoj la plej favorajn donis Radio Roma, Akademiano F.Faulhaber, dro T.Pumpr kaj J.Kořínek. Krome venis multaj kompletigaj informoj. Konfirmoj pri la libro oni ricevis ekz. el Sovetunio, Hungario, Pollando, Italio, Jugoslavio, Danlando, Svedio, Francio, Nederlando, Brazilo k.a. Prezo 20 Kčs. Mendu ĉe: Jaroslav Kuzník, Opava, U Jaktařské brány 8, ĈSR.

Turismaj informoj el Pollando. Ilustrita, lukse eldonita broŝuro informanta pri turismo kaj vidindaĵoj en Pollando, kun artikolo pri la 44-a Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio. Ricevebla senpage. Skribu al: Pola Vojaĝoficejo "Orbis", Warszawa, Bracka 26, aŭ al: Komitato por Turismo, Warszawa, Hoza 20, aŭ al: Pola Esperanto-Asocio, Warezawa, Nowy Swiat 27.

Aĉetu amase la kongresan glumarkon! La kvarkolora glumarko de la 44-a Universala Kongreso en Varsovio estas desegnita de unu el la plej famaj polaj artistoj. Prezo: unu folio de 25 pecoj = 0,25 dolaro (6 zlotoj). Liveras: 44-a Universala Kongreso de Esperanto, Warszawa, Pollando.

Esperanto-Grupo en Ravenna (Italio), kiu eldonis 32-paĝan ilustritan gvidilon pri la urba Ravenna (ricevebla senpage), petas pri alsendo de esperantaĵoj, belaj, filatele afrankitaj bildkartoj, revuoj, libroj k.a. Precipe oni ŝatas ricevi bildkartojn pri popolaj kostumoj por ekspozicio kaj biblioteko. Adreso: Esperanto-Grupo, Ravenna, P.Anita Garibaldi I, Italio.

A.G.Provost: Tajpado. Teorio - praktiko, konsiloj por studo de la klavaro, tekstoj por akirado de rapideco. 34 paĝoj, formato 21 x 27 cm.

Tiu ĉi stencilita lernolibro estas malofta de sia speco. Kiu deziras lerni Esperantan tajpadon (maŝinskribon), trovas en ĝi konvenajn konsilojn kaj rekomendojn. La uzado de la skribmaŝino pli kaj pli disvastiĝas. Tial estas bonvena la verketo, kiu instruas al gesamideanoj, kiel akiri rapidan kaj seneraran tajpadon. La aŭtoro havas sian specialan metodon, sepfingran. Sed kiu jam lernis, ekz. en ĉs. ekonomiaj lernejoj aŭ en kurso, la 10-fingran metodon, povas sammaniere ekzerci la Esperantan tajpadon. Tamen, ne nur por la tajpistoj povas la libro esti interesa. Ĝi enhavas 70 ekzercojn, fragmenojn el diversaj verkoj pri diversaj temoj. Tiamaniere ĝi estas legaĵo pri multaj aferoj el la mondo. - Havebla ĉe la aŭtoro en Paris XX^o, Rue Lesage 15, aŭ ĉe A.Staŭnura, Táboraká 42, Ostrava-Radvanice, por 1 resp.-kup., respektive Kčs 5,-.

Pierre Flageul: Lernolibro de Esperanta stenografio. 16 paĝoj, 21 x 13 cm. Tiu ĉi bele presita lernolibreto prezentas al ni adapton de la franca geometria sistemo Duployé por E. La sistemo Duployé apartenas al la plej simplaj stenografioj, ĉar ĝi havas malmultajn regulojn. Estas necese, ke ĉiu lernanto de la stenografio konsci, ke nura scio de la stenografia alfabeto ne ebligas parol-rapidan skribadon. Tian oni akiras nur post longa kaj tre persista ekzercado. Havebla por 1 resp.-kup. ĉe A.G.Provost, rue Lesage 15, Paris XX^o, aŭ por Kčs 1,- ĉe A.Staŭnura, Táboraká 42, Ostrava-Radvanice.

El Sovet-Unio ni ricevis prospekton rus- kaj esperant-lingvan pri Fonostenografio aŭ Rapida aŭdskribaĵo, verko de O.S.Aleksandrova en Kiŝinev. La libro instruas novan stenografian sistemon por la rusa lingvo kaj krome enhavas specimenojn de adaptoj por 7 pluaj lingvoj, inter ili por Esperanto. Ni klopodos havigi la libron kaj informi pri ĝi niajn legantojn. ASt.

Delfi Dalmaŭ: Dialekto, dialektiko. 92 pĝ., 12 x 16 cm. La libro konsistas el vico de eseoj, (ekz.: Nacia kaj internacia, Esperanto kaj pasiva poliglotismo, Doktrino kaj lingvo, Esperanto, natura lingvo. Post la venko k.a.), kiuj iom post iom malkaŝas al ni dialektikon de esperantisto. Post ĉiu temo estas paroligaj demandoj, tial la verko fariĝas utila ankaŭ por gvidantoj de superaj Esp.

kursoj. Prezo: 10 steloj, 5 ekzempleroj 40 steloj - plus afranko (10%). 1 stelo = -.07 us.dol. Eldonita ĉe: BELPOST - Apartado 5164 - Barcelona -- Hispanujo.

Por Esperantaj gepatroj kaj infanoj: Gepatroj, mendu por vi specialan bultenon por dulingva edukado de viaj infanoj! En "BULTENO GEPATRA" vi trovos multajn artikolojn, kantojn, poemetojn, valorajn spertojn kaj konsilojn pri dulingva edukado. "Bulteno Gepatra" estas bone presata sur bonkvalita papero kaj ilustrita. Jara libervola kotizo estas 20 Kĉs.

El Esperanto Press, kie ĝi estas presata, vi povas mendi ankaŭ multkoloraj ilustritajn infanlibrojn kun Esperanta teksto, taŭgajn por infanoj en "aĝo de du ĝis dek kvar jaroj. Listo de mendeblaj infanlibroj:

"Ni legas bildojn" - 47-paĝa, sen teksto (12,90 Kĉs).

Gvidilo por "Ni legas bildojn" - 37 paĝoj (7,70 Kĉs).

"Mia frateto" - por 2-5 jaruloj kun engluita teksto

"Domoj" - precipe por 5-jaruloj 15,60 Kĉs

"Lanĝo montras la vojon" - 6-10 jar. kun engluota teksto

"Penjo kaj ŝiaj amikoj" 9,20 Kĉs (prks. unu-

"Bienbestaj amikoj" - por 4-8 jar. hora laboro),

"Alko kaj Suna en siaj du dometoj" de Verna Hills - 78 pĝ.,

21 tutpaĝaj diverskoloraj ilustraĵoj, bindita en moderna plasta kovrilo - (17,50 Kĉs).

Ĉiujara murkalendaro (de Esperanto Press) - (11,00 Kĉs).

Ĉiujn menciitajn esperantaĵojn vi povas mendi ĉe la peranto: Josef Otta, Červená Voda 165, okr. Zábřeh.

La sama samideano enketas la nombron de denaskaj esperantistoj en Ĉeĥoslovakio. Kiun ĝi koncernas bonvolu anonci al la menciita adreso de J.Otta: nomon de la denaska esperantisto, naskiĝdaton kaj adreson. La statistiko estas prizorgata tutmonde. La laboron gvidas s-ro Sirkku Koivu, finna peranto de "Bulteno Gepatra".

KIAM kaj KIE KUNVENAS ESPERANTISTOJ en OSTRAVA

VÍTKOVICE	- Z.K. VŽKG "Zámek"	- merkrede	- 19,30 – 21
TRAMISTOJ	- Z.K. DPMO apud la teatro	- lunde	- 19 – 21
HULVÁKY	- Kulturdomo	- vendrede	- 18 – 20
MICHÁIKOVICE	- Z.K. de P. Cingr	- ĵaŭde	- 18 – 21
PORUBA	- Z.K. de Bytbetav	- marde	
ORLOVÁ	- Brigádnický domov Trust	- ĵaŭde	- 16 - 18
KRAVAŘE	- Osvětová beseda	- marde	18,30 - 20,30

Radio VARSOVIO LASTMOMENTA INFORMO

Ekde la 4-a de aprilo la Pola Radio komencas ĉiutagajn radioelsendojn.

Ondoj: 249m, 25.39 - 30.98 - 31.45 - 31.50 - 41.12 - 42.11. Tempo: 16.30-17.00

ĈU VI DEZIRAS RICEVI LA 2-an NUMERON DE "FAJRERO"?

Do pagu la monsubtenon 12 Kĉs por la jaro 1959! La pagiloj estas riceveblaj en la administrejo.

LEKANTETO

PORINFANA PAĜO DE FAJRERO

BULTENO GEPATRA 58/4 (62)

alportas artikolon "Memoru Lekanteton" kaj mencias kelkajn raportojn kaj ideojn el la 40-a n-ro. Ni represas:

... Ne estas speciala fenomeno, ke kontento silentas kaj ne malofte malkontento lamentas. Kvankam ankoraŭ neniu eĥo rimarkiĝis, la imitinda agado tamen efikas. Ni scias, ke TAGIĜO kun siaj bonaj artikoloj kaj siaj artaj desegnaĵoj estas legata ne jam eble de junuloj. Ĝi estas, tute margene, uzebla ja ankaŭ kiel facila legaĵo en kurso aŭ lernejo. Tiu ĉi stimulo tamen ne falsu ĝian originan destinton. Infanoj apenaŭ el si mem legas tian gazeton. Do al iliaj gepatroj sin direktas "la pago per infanoj", donante al ili rimedojn, helpilojn por ankaŭ-esperantlingva edukado. La lingva praktikado en la familio konsistas ne el nura parkerado de poemetoj aŭ kantoj, sed daŭradas ĉiutage dum jaroj paralele kun la normala edukado kaj la mensa evoluo de niaj gefiloj." wbr.

Ĉeĥaj infanoj: BRIGADO DE AMIKECO KAJ AKTIVECO

En Nürnberg ni forlasis la vagonaron, kiu estis plena de turistoj por Aŭterio, Italio kaj Jugoslavio. Nia vojaĝ-celo estis tamen Ĉeĥoslovakio, do ni devis vagonŝanĝi. Ĝoje ni kaptis la Orient-Eksprezon al Praha.

Kiom ni nun sopiris al la ĉeĥoslovaka lando. Kiel ni nun deziris vidi la urbon kun la cent turaj, sed precipe niaj koroj tiris nin al la fina renkonto kun niaj geamikoj.

Kaj ni vere renkontis ilin!

Ni ne plu estis geamikoj, sed gefratoj. Kun ili ni vidis la belan ĉeĥan landon, kies popolo estas tia ĉarmega. Inter ili ankaŭ estis niaj junaj geamikoj: la ĉeĥaj infanoj.

KIEL NI LERNIS MANGĜI FUNGOJN.

Ĉiuj ni ekpromenis por vidi la pentrandan ĉirkaŭaĵon de la vilaĝo. Gaje kunpaŝis la infanoj: LENKA antaŭe - kiel ĉarma ĈEDOKa gvidantino - por montri la plej belajn vojetojn. Ni eniris grandan arbaron. MARTIN saltis kaj trotis kiel ĉevalo en la printempa herbejo. De tempo al tempo li tute malaperis inter la arboj. Subite sonis la skriko "Fungoj!" - kaj la infanbrigado estis formita. Kun granda certeco, kiu nin surprizis, la geknaboj kolektis manĝeblajn fungojn. La konkura fervoro estis senlima. Post mallonga tempo estis plena la valizo de la patrino. Eĉ la malgranda EVA alportis gravan parton.

Hejme oni por ni preparis la trovitajn fungojn. Kia apetitiveka manĝaĵo! La unuaj gluttoj: ni devas kutimiĝi al la gusto. La infanoj plenstreĉe rigardas. La sekvantaj gluttoj: bongustaj, bonegaj, delikataj! Dank' al la infanoj ni nun estas ĉi tiun tipan ĉeĥan manĝaĵon.

LA DONACO DE MARTIN.

Ni transiris la ponton super la belega rivero "Divoká Orlice". Sub la impreso de la majesta spektaklo, Marjo haltis por observi la sovaĝan, daŭre moviĝantan akvon. En la mano ŝi tenis utilan bastonon. Martin donis ĝin al ŝi, dirante: "Vi, nederlandanino, ja kutimas ebenajn kampojn. Bastono donos apogon je niaj deklivaj vojoj".

Tiaj estas la ĉeĥaj knaboj. Ili ekscias kion oni bezonas kaj kreas tion.

BOŽENKA

Tiam ni renkontis Boženkan. Ŝi tiris veturileton sur kiu staris kuvo plena de tolaĵo. Kiel lerte ŝi povosciis eluzi la purecon de la fluanta riverakvo por lavi la vestojn. Ĉu ŝi iam estos inĝenierino kaj bridos la sovaĝan akvon per granda baro? Tiam ŝi denove eluzos la forton de la fluanta akvo, sed nun por gajni energion.

Ni travivis tre agrablajn momentojn kun la ĉeĥaj infanoj. Ni certe revenos. Pro tio: ĜIS
BALDAŬA REVIDO! Na shledanou! Marjo kaj Peter van Bentum
Sportlaan 1234, Hago (Nederlando)

GENURAJDANTO

Hop, hop, hop,
Galop, galop, galop!
Peĉjo rajdas sur ĉevalo
Tra kamparo al arbaro
De la monto al la valo!
Hop, hop, hop,
Galop, galop, galop!

KVIN KATETOJ (Fingroludo)

Tiu kato kuŝas,
tiu ĉi sin puŝas,
Tiu kato ternas,
tiu pene lernas.
Kaj tiu malgranda tamburas.
Nun ĉiuj kvin forkuras!

(Ambaŭ poemetoj laŭ Bulteno Gepatra 58/2 (60),

Ĝojigis nin kontribuadoj de Jana kaj Ludmila Ŝemberová kaj Jana Telyčková, aninoj de la infana Esperanto-kurso en Lanškroun (gvidas f-ino Naďa Jirečková). La fabelojn ni represos en la venontaj numeroj.

KONSTANTY ILDEFONS GALCZYŃSKI

apartenas al la plej famaj polaj lirikistoj. La heredaĵo postlasita de li estas granda. Unuopajn versaĵojn li presigis jam en la jaro 1921 dise en la gazetaro. Unuan poezian kolekton li eldonis en la jaro 1930. Poste sekvis aliaj, sed nur nun lia edzino Natalia G a l c z y n s k a prilaboris kaj eldonis plenan kolekton de liaj verkoj (poezio, prozo, teatraj provoj k.a.). Lia poezio estas karakteriza per kunligado de liriko kun humoro, moko kaj grotesko. Interesa estas lia ciklo de teatraĵetoj-humoraĵoj "La Verda Ansero", kiun li verkis postmilite.

=====
Teatreto "La Verda Ansero"
havas honoron prezenti psikologian dramon
"Sep dormantaj fratoj".

Unua frato: (ronkas)
Dua frato: (ronkas)
Tria frato: (ronkas.)
Kvara frato: (ronkas)
Kvina frato: (ronka)
Sesa frato: (ronkas)
Sepa frato: (terure ronkas).
K u r t e n o
=====

Teatreto "La Verda Ansero" havas honoron prezenti
"Formaliston dum libertempo".

Personoj: Formalisto
kaj amatoro de banado.

Amatoro de banado (meze de lago):
Helpon!

Formalisto (sur lagbordo):
Nomo?

Amatoro de banado (kiel supre):
Eble Jankovski. Helpon!

Formalisto: Antaŭnomo?

Amatoro de banado:
Petro. Helpon!

Formalisto: Antaŭnomo de la patro?

Amatoro de banado:
Ankaŭ Petro. Helpon!

Formalisto: Antaŭnomo de la patrino?

Amatoro de la banado:
Balbina. Helpon!

Formalisto: Civitaneco? Profesio?

Amatoro de banado:
gl... gl... gl... gl... gl...
gl... Rl,.. gl... gl.., gl...
(dronas)

Formalisto: Mi nenion komprenas.
(rigardas la ĉielon)
La tago fariĝas belvetera.

K u r t e n o

Teatreto "La Verda Ansero"
havas honoron prezenti: "Manĝeman Evon"

Ludas: Serpento, Adamo kaj Eva.

Serpento: (transdonas al Eva pomon sur la platoŭ:
Ekmanĝu kaj donu al Adamo.

Adamo (kriegas): Donu ekmanĝi! Donu ekmanĝi!

Eva (formanĝas la tutan pomon).

Serpento (konsternita): Kio nun okazos?

Adamo: Malbone. Tuta Biblio ne validas.

K u r t e n o

Teatreto "La Verda Ansero"

havas honoron prezenti

Teruran interparalon de Gĵegĵolko kun Spirito.

(Dekoracio: senatana ĉambrego en Vavelo).

Gĵegĵolko: Kio nova?

Spirito: Nenio?

Gĵegĵolko: Do bonordone.

K u r t e n o

Trad. A. P E T T Y N

LINGVA ANGULETO ĵus x ĝuste

En esperantistaj kunvenoj de Ostrava-regiono enradikiĝis tre bona kutimo elekti lingvajn observantojn, kiuj fine de kunveno aprezas la lingvan nivelon kaj atentigas pri faritaj eraroj. En la lasta renkontiĝo en Orlová (22.3.1959) estis tuŝita ankaŭ la problemo /!/ de ĵus — ĝuste. Pere de "Fajrero" la ekspliko estas nun prezentata al pli vasta publiko.

Ofte oni erare uzas la adverbon ĵus, konsiderante ĝin tempa adverbo sen plua limigo. Konsciu, ke ĴUS povas esti uzata nur kiel tempa adverbo

1. antaŭ verbo is-forma,
2. antaŭ verbo kun aspekto momenta, komenca aŭ fina, ekz.:
Li ĵus malfermis la pordon.
Li ĵus ekdormis.
Li ĵus finmaĝis.
3. kaj signifas agon, kiu okazis momenton antaŭ la aktuala momento, ekzemple:
Vi venis al Karel kaj li ĵus forlasis la domon. (antaŭ momento)
En okazo de samtempeco oni devas uzi adverban ĜUSTE, ekzemple:
Vi venis (venas) al Karel kaj li ĝuste forlasis (forlasas) la domon. (samtempe)
Agoj estas samtempaj, se almenaŭ unu verbo estas daŭra (kun tempa uzo de ĜUSTE), ekz.:
Mi venis kaj vi ĝuste (ne ĵus!) dormis.
ĜUSTE estas uzata ankaŭ en senco de "precize", ĝi identigas, ekzemple:
Ĝuste pri tio mi parolis.

Uzo de ĴUS en tia kazo estas erara, ĝi estas adverbo nur tempa, responda al la nerfektaj tempoj.

=====

Mariusz Dastych: AL SIMPATIANTOJ

Ho, plej facila,
lingvo utila — Esperanto !
Ĉiu deklaras sin simpatianto
de l' ideo,
de l' mondfratiĝo, pacarmeo,
sed ne komprenas vero-fraŭpon,
ke ĝi ne venas mem en kapon.

PRI KELKAJ ESPERANTO-KLUBOJ

Ekzistas dubo
pri tiu klubo,
kies anoj
lingvo-propagandon
fari volas,
kvankam nek skribas,
nek parolas.



Melankolie
LA HERBOJ OJAS EN LA KENTUCKY-LAND, ĈAR
FANDI LUDAS SENZORGE ĈU' KARAN', ĜA-

BRILAS LA SOMERA SUN', HERBESJ FLORAS KAJ
JEGE SEN MELANKOLIO,
SED IAM FRANDI MAL-

EL LA FOLIAK' SOPAS ĈIAM BIRDAJ KANTOJ
ĜOJ AL LA BOP' NUD NUD

Mare
NUN, EN' VI KENTUCKY-LAND, POR VI,
BLORU NE, NEGRINO', ĈE LA KAMPARA

RAJ', SED EKSDUJ KANTO PRI LA KENTUCKY-HEJN, NELLE

KAZA MALPROKSIMA LAND'.

KARA KENTUCKY-LAND'

Usona

Trad. P. Bennemann

Rimarko al "Dek aforismoj, el kiuj ĉiu estas sentenco ne sen senca*" (Tagiĝo 12): 10 aforismoj estas dividendaj je 3 strofoj laŭ jena skemo: 1/ 1,2,3,4; 2/ 4,5,6,7; 3/ 7,8,9,10. - Teksta adapto fine de la 2-a kaj 3-a strofoj:

La pulo saltas en galopo - eĉ sur krani' de episkopo, - sur krani'o, - eĉ sur krani' de episkopo. Prudenta hom' ne iras vere - al necesejo senpapere, - necesejo, - al necesejo senpapere!

EN LERNEJOJ KAJ KURSOJ

Hodiaŭa ni publikigas diskutindan kontribuon de instruisto Josef Bureš el Dolní Radechová (p. Náchod), kiu instruas Esperanton kaj en lernejo kaj en kurso. (Laŭ "Alvoko 1" en Tagiĝo 42 sendu pliajn kontribuojn al VI. Novobilský, prom. Chem. Ústín/Labem, Na vlnovce 3.)

Ankaŭ mi uzas rektan metodon de A. Cseh, kiu ŝajnas al mi plej konvena, ĉar ĝi estas sufiĉe demonstrativa. Samtempe mi uzas ĉeĥan klarigon de gramatiko. Tiu elementa kurso preskaŭ ĉiam sukcesas, sed preskaŭ ĉiam malsukcesas la daŭrigo – perfektigado. Dum kelke da jaroj mi gvidis E.kursojn en Náchod, Nové Město n/Met. Kaj nun ankaŭ en Dolní Radechová apud Náchod. La elementa kurso bone progresas. Ĉiuj entuziasme ĥore respondas kaj legas nete skribitan romanon Nik Nek. Samon mi jam spertis en pasintaj kursoj, sed fiaskis plua perfektigado.

Kursanoj estas kompreneble tre diversaj. Junaj, maljunaj, laboristoj, oficistoj, studentoj, instruistoj kaj unu profesorino. Mi denove sentas dangeron. Ĉu ree fiaskos la laboro? Kiamaniere kunligi ilin ĉiujn kaj kian materialon uzi por ne perdi nunan intereson? Mi provis jam kelkversajn metodojn. Traduki iom malfacilajn artikolojn, fari malgrandajn prelegojn, interesigi la kursanojn per amuza legaĵo, sed ĉio ne estis tiom interesa, kiel ĝi devus esti. Mi provis la kunvenojn riĉigi kaj trovi helpantojn inter la gelernantoj. Ankaŭ tio fiaskis. Unu interesiĝas pri poŝtmarkoj, alia pri astronomio. Unu deziras danci, alia diskuti pri psikologio, sed neniam mi sukcesis elekti ion, kio estas dezirata de ĉiuj. Al ĉe-metodo bone konvenas la romano NIK NEK, ĉar ĝi rekte servas la progreson en lecionoj. Lernantoj tiel daŭre praktike uzas novajn vortojn vere bone komprenas la enhavon, ili estas konvinkitaj, ke Esperanto estas facila, ke ili estas kapablaj ellerni ĝin. Kaj tuj post finiĝo de la kurso perdiĝas ankaŭ la entuziasmo pro tio, ke la perfektigado ne plu estas flua, sed saltado de unu regulo al alia laŭ enhavo de legata artikolo. Eble ankoraŭ aliaj influoj kulpas.

Kiamaniere vi sukcesas post elementa kurso daŭrigi kunvenadon en tia entuziasma kaj amuza tobo kaj malhelpi iom post iom disiĝon? Post nelonga tempo mi finos du elementajn kursojn kaj mi denove haltos ĉe la demando, kion nun fari? Mi pensas, ke estus utile publikigi tiuspecajn spertojn, eble rekomendi helpan literaturon aŭ priskribi modelajn instruhoron.

En normala lernejo tiuj problemoj ne ekzistas, ĉar lernantoj DEVAS studi. Do instruisto povas igi ilin esti diligentaj ĉu instruobjekto ilin interesas aŭ ne. Dum kunvenoj tiaj manieroj estas absolute neblaj. Foje sufiĉas nur malgranda malkuraĝigo aŭ eta riproĉo kaj la kursano adiaŭas. Mi opinias, ke ĉiuj instruistoj, kiuj gvidas E. Kurson prilaboris certan instru-planon kaj havas preparitan ĉiun instruhoron. Estus vere utila por ni ĉiuj ricevi tian planon (povus ĝin prepari niaj eminentaj E.instruistoj) kaj tiel unuigi instruadon de E. en la tuta respubliko. La someraj kolegioj, kie estas kursoj A,B,C, ankaŭ havas abundajn spertojn.

Konkurso de Fajrero 1959

La redakcio de "Fajrero" metas antaŭ vin la unuajn du taskojn de "Konkurso de Fajrero 1959". Entute estas preparitaj 6 taskoj kaj 5 líbropremioj por la plej sukcesaj partoprenontoj. Per la konkurso ni sekvas reciprokan proksimigon inter "Fajrero" kaj la legantaro. Certa ambaŭflanka profito estos rimarkinda, viaflanke precipe la lingva. La kategorion elektu laŭ viaj lingvaj scioj. La tradukojn bonvolu sendi al la redakcio plej malfrue unu monaton post apero de ĉi numero!

I-a KATEGORIO. 1-a tasko: Traduki en ĉeĥan lingvon la artikoleton en "Lekanteto" de tiu ĉi n-ro: Kiel ni lernis manĝi fungojn.

2-a tasko: "Traduki fragmenton el la libro de E. Valenta "Jdi za zeleným světlem" (2-a ĉapitro):

Dolina nebyla samostatná obec; patřila k Zálesí. Vždyť tu bylo konec konců jenom nějakých dvacet chalup a dvě větší hospodářství, ovšem kromě padesáti vil a vilek, které však sloužily z valné části jenom o prázdninách. Malá přízemní jednotřídka svítala žlutě u dálnice hned proti hrázi rybníka Šípu, zrovna tam, kde se začínalo stoupání k Zálesí zatáčkou k Losově hájovně. Kus za dědinou, v údolíčku Čeperky, pod rybníkem Kuňákem, stál ještě osamělý mlýn a zbytek staré cihelny, která kdysi dávno dosloužila.

II-a KATEGORIO. 1-a tasko: Traduki:

- a) je samozřejmě, že příští rok se opět zúčastním tábora.
- b) Nepřišel Jiří, ani Karel, přece jsme však zvítězili.
- c) Počkám zde třeba pět dní, dokud nepřestane pršet.
- d) Naučil jsem se krásnou českou píseň.
- e) Potřebuji nějaký starší fotoaparát německé značky.

2-a tasko: "Traduki fragmenton el la libro de E. Valenta "Jdi za zeleným světlem" (4-a ĉapitro):

Černá pikolka starého doktora Sehnoutky poskakovala hrbolatým úvozem klesajícím k vile mezi lesem a nemocnými švestkami; doktor hlasitě a vytrvale halasil klaksonem, jehož jekot vnikal pronikavě v těžké a nehybné ticho připravené popoledni hodiny. Stočil pod strážkou vozík jako na čtyřáku a brzdy krátce hvízdly zrovna pod domovníkovým oknem. Doktor, aktovku v ruce, hubený prudký, tajtrlicky rtuťovitý, kráčel cestou od brány k vile proti Šimonovi, který mířil k němu od perníkové chaloupky. Lékař před chvilkou náhle telefonoval a byl očekávám..

SOMERAJ ESPERANTO-TENDAROJ DENOVE FARIĜAS AKTUALAJ.

Pripensu vian ĉeeston!

Unu duetapan tendaron (SET) preparas E.grupo en Písek.

Situo de la tendaro ne estas ankoraŭ definitive fiksita. Dume oni traktas pri la tereno sur bordo de la rivero Lužnice apud Bechyně. La datoj:

19.VII.- 1.VIII.1959 - kursoj B, C, D,

2.VIII.- 15.VIII.1959- kursoj B, C, (A).

Pri okazigo de la dua tendaro nun traktas E.grupo en Třebíč. Unu el la disponeblaj lokoj estas tiu apud la valdigo Vranov n/Dýjí.

La informojn pri SET-59 donas: Dieter Berndt, Nová Kamčátka, Petřvald u Karviné.

M. Bohunová: REMEMOROJ PRI SET.

Malproksime, por mi nun tre malproksime, situas la ĉarma kaj kvieta valo, kiun vivigas nur gluglado de vigla rivereto kaj susurado de maljunaj arboj. Kara valetu, certe ankaŭ ci nun rememoras kaj songas pri la pasintjara SET, kiu cin por mallonga tempo alpremis al sia amikeca koro, kies parteto ankaŭ mi tiam estis! - Ĉu nur tiam? Certe ne, mi restos tia por ĉiam! Por ĉiam, por ĉiam! Dume mi nur rememoras cin. Cia zumado, murmurado kaj gluglado ankoraŭ vibras en miaj

oreloj - en mia animo. En miaj okuloj ankoraŭ pendolas cia freŝa kaj bunta vestaĵar'. El la gorĝoj de SETanoj aŭdiĝas kantoj, rido kaj ĝojkrioj de matenruĝo ĝis la krepusko tra tuta cia sino.

Post la matena kanto komenciĝis bolanta vivo en la tendaro. La lernadon sekvis amuzo kaj male. Kaj eĉ nerimarkite venis vespero - melankolia kanto fermas la tendaran vivon kaj bonvenigas nokton, alportanta ripozon al ni kaj ci, kara, bonodora valo: Sed la vivo ankoraŭ ne deziras esti venkita. Ĝi ekpulsas ĉirkaŭ la tendarfajro - krono de la tendara vivo. Spritaĵoj, ŝercoj, gajaj rakontoj, poemoj kaj denove aŭdiĝas kantoj kaj ĉio miksiĝas super la flamoj en unu gaja tuto. Fine regas ĉie silento, nur cia rivereto muzikas kaj lulas nin en sonĝon.

Kaj tiel pasis nerimarkite tago post tago kaj, subite aperis la momento de reciproka adiaŭo. Finiĝis la tagoj, kiuj ligis junajn korojn en amikeco, montrante al alia mondo, ke ĉiuj landoj, popoloj kaj homoj povas vivi en reciproka frata amo. Dume sonĝu, kara kaj bela valo, sed baldaŭ voku min! "

(Fragmento el konkursa kontribuajo - 1958).

KORESPONDI DEZIRAS:

■ Membroj de la rondeto "La Verda Branĉeto" ĉe la Kiŝinjoĵva Doma de pioniroj skribis al la redakcio belan leteron, el kiu ni citas: "Ni estas 15-16 jaraj geknaboj, gelernantoj de mezlernejoj. Nia urbo Kiŝinjoĵv estas la ĉefurbo de Moldavia respubliko. Ĝi estas la plej granda urbo en Moldavio kaj kreskas pli kaj pli multe ĉiutage. Ni studas Esperanton ne delonge, sed ni tre ŝatas ĝin, ĉar ĝi estas tre facila, bela kaj eleganta kaj ĝi estas la lingvo de paco kaj amikeco... Ni tre deziras korespondi en Esperanto pri diversaj temoj: pri muziko, filmoj, poŝtmarkoj k.a. Skribu al la adreso: Tamara Tereŝĉenko, Kostuĵenskoĵe ŝosse 27/9, KIŜINĴOV, Moldavio, USSR.

- Hukuta Masao, Koenzi 6-695, Suginami-ku, TOKIO, Japanio. - Pri fotografado.
- Ing. Michael Lodziana, str. PKWN, n-o 27/7, Bielsko - Biala, Pollando.
- Voicaleccu Stelicá, Calea Grivitei n-o 13, Raionul Stalin, Bucuresti, Rumanio. - 22-jara stud. de fervoja teknika instituto serĉas leteramikojn en ĈSR.
- En majo hungara knabin-gimnazio havos Zamenhofan pac-solenon kun ekspozicio kaj petas el ĉiuj landoj: bildkartojn, fotojn pri junulara vivo en lernejoj kaj organizoj, afiŝojn, revuojn. Adreso: Áll. Gimnázium, Budapest II, Lórántffy Za.u.3, Esperanto Fakrondo, Hungario.
- ESPERANTAN AFIŜAN EKSPOZICION aranĝos fine de aprilo Budapeŝta Esperantista Junulara Grupo en la ENGELS-placa Kulturdomo. Ĉiuj gejunuloj kaj la ceteraj esp. estas petataj, ke ili sendu novajn Esperantajn afiŝojn al la adr.: Esperanto-Junulara Grupo, Budapest XIII., József Attila tér. 4, Kulturdomo, Hungario. - Certa rekompenco.

Ni dankas al niaj subtenantoj: L.Magera, Ostrava, 3 - F.Polášek, Ostrava, 3 - MUDr J. Fousek, Přelouč, 8 - Vl. Sedláček, Karviná, 50 - Prof.J. Filip, Chlemy n/Ostř. 3 - A. Odehnal, Karviná, 3- A. Nydrle, Kladno, 3- O.Drunecký, Ústí n/L. 8 - Ing.Jonáš, Ústí n/L, 3 - J.Kasal, Přibyslav, 6 - F.Lička, Ostrava, 3 - J.Kociánová, Varín u Žiliny, 3 - M.Pilařová, Strakonice, 1 - A.Hlaváček, Praha, 3 - Jos. Vondroušek, Brno, 3 - J. Tylš, Pavlišov, 3 - J.Skopalák, Šlapanice, 3 - M.Novák, Praha, 8 - M. Basl, Tábor, 3 - S. Staněk, Praha, 3 - M.Matušková, Opava, 8 - J.Brankytl, Ostrov n/Oh. 6 - O.Pour, Dymokury, 3 - B. Novobilský, Brno, 8 - K. Chudoba, Gottwaldov, 3- V.Kaplánek, Mar. Lázně, 8- J.Hudec, Liberec, 3- J.Zemek, Rumburk, 3- F.Němec, Brno, 2- J.Skopalík, Gottwaldov, 8- J.Rozbroj, Suchá, 3- F.Motyčka, Písečská, 8 - J. Čermák, Ostrava, 8 - V.Střítavka,

STATUTO DE ĈEĤOSLOVAKA ESPERANTO-KOMITATO APERIS EN LA 9-a KAJERO (31.3.1959) DE "VĚSTNÍK MINISTERSTVA ŠKOLSTVÍ A KULTURY" (BULTENO DE LA MINISTERIO DE LERNEJOJ KAJ KULTUROJ, pĝ. 83-84!


Radio horoj laŭ mezeŭropa tempo.

I – informoj, P - paneladoelo. PRI VARSOVIO VIDU pĝ. 13!

Dimanĉo	20.00-20.25 SOFIA, 49.42m, 39.11m. P. 23.30-23.55 SOFIA, 39.11m, 30.93m. P.
Lundo	18.30-18.35 BERN, 48.66m, 31.46m, 16.87m. P. 19.10-19.30 VALENCIA, 233m, (1285 kcs). P. 23.40-23.57 HILVERSUM, 298m, (1007 kcs). PNCRV. Nur la unuan lundon de ĉiu monato.
Mardo	12.55-13.00 BERN, 48.66m, 31.46m, 13.94m. P. 17.40--17.50 WIEN, 513m. (584 kcs), 293m, (1025 kcs.) 48m, 41m, 30m, 25m, 16m, 11m. I. 18.55-19.10 ROMA, 50.34m, 41.24m, 30.90m. P. 20.00-20.15 STOCKHOLM 32.30m, 26.20m; 20.20m. P. (nur la lastan mardon de ĉiu monato)
Merkredo	18.55-19.10 ROMA. Kiel marde. 23.50-24.00 HILVERSUM, 402m, (746 kcs), I. VARA.
Ĵaŭdo	12.55-13.00 BERN, Kiel marde. P. (D-ro Privat). 24.05-24.20 ZAGREB, 264m, (1135 kcs). P.
Vendredo	16.30-18.35 BERN. Kiel lunde. P. (D-ro Privat). 18.55-19.10 ROMA. Kiel marde.
Sabato	23.15-23.22 HILVERSUM, 298m, (1007 kcs). P. KRO.

Krucenigmo de fajrero!

Aŭtoro: D. Svozílek



HORIZONTALA: 1) Parto de la zoologio – pri birdoj. 2) blovmuzikilo, 3) resenda pronomo de la tria persono, malrapide galopi, sufikso. 4) paŝi, prenanta en posedon iun lokon, pli ol ŝati. 5) membro de hist.germana gento /r/, membropago /r/, nenormala malgrandegulo /r/, 6) adjektivigita prepozicio, promesas profiton, malgranda. 7) nordafrika rivero /r/, gvidisto de aviadilo aŭ ŝipo, teksaĵo /r/, tri nuloj, gaso riĉa en aero, el valora metalo.

VERTIKALE: A) por ni utila gaso. B) moka dirmaniero. C) interjekcio, membro de eŭropa nacio, D) unuaj tri literoj de flava malsano. H) pezo de ĉiuspeca envolvo /r/. F) metalo de

juveloj. G) estas en ĉiu loĝejo /r/, H) persona nedifinita pronomo. I) oka litero de E.alfabeto, malgranda ano, J) neprofesiulo /r/. K) simpla r = l

Helpa konsilo: meza kvadrato egalas horizontale kaj vertikale.